

	<h1>PENSEO</h1>	<i>N-ro 188</i> <i>Junio/2007</i>
	Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994	
Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 18-a jaro http://www.elperno.net/penseo/penlisto.htm		

Eto

Knabeco

—laŭ ĉinesko Yijiangnan*
Okaze de Infana Tago

knabeco
la suno ora
prilumas mian koron
kristalan kun favora
la lumo glora

knabeco
ondanta maro
alportas al mi larmojn
pri pasintaj koŝmaro
kaj petol-faro

knabeco
floro aroma
beligas l' ordinaran
vicon kun ĝojo doma
kaj simpla noma

knabeco
numero blanka
jen min al firmamento
profunda kaj blu-planka
ĉagren-senmanka

knabeco
gajplena roĵo
forfluis malproksimen
kun mia plend-malĝojo
fojon post fojo

* Unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo de xa,xa,a (x=senrima).

Antikvaj Poemoj

Bai Juyi (772-846)

Persikfloroj en Dalin-templo

April' floradon finis jam en la homa mondo,
sed temple persikfloroj ekpompas sur la
monto.

Bedaŭris mi sen-scie: Kien nun la printempo?
Ĉi tien! ekster mia atendo jen respondo.

Tradukis **Guozhu**

Han Yu (768-824)

Fazan' Trafita Sage

En kvieto kampa brulis la ĉasfajr' invade,
fuĝe ĵetis sin fazan' sub agla ĉas-minaco.
Por elmontri la ĉas-lerton militĉef' parade,
forte streĉis arkon ŝajn-atende kun sagaco.
Plimallarĝis preme la sieĝ' de homamaso,
pro surpriz' fazan' elflugis kaj trafita sage.
Ĝi barakte puŝis sin en homojn sen forlaso,
falas teren kun plumar' sangmakulita svage.
Militĉef' ridegis en ĉirkaŭa huraado
pri ĉasaĵo kolora ĉe ĉevalĉara rado.

Tradukis **Vejdo**

Wang Jian (847-918)

Kanzoneto pri Ŝiphaŭlisto

Ve, kiel ŝiphaŭlisto servas mi mizere,
por reĝo trenas ŝipojn ŝvite sur haŭlvojo.
mi tage klopodadas kun malmulta ĝojo,
tranoktas surboate akvbird-maniere.

Mi kontraŭflue penas kun streĉita forto,
 ne vidas kie estas la staci' celita.
 Noktmeze en vetero pluve neĝ-agita
 ordono pelas min al servo kun kohorto.
 Kun vest' malseka nokta-froste ĝis la haŭto
 kaj pikdolor' neeltenebla je kalkano
 ne povas ni elverŝi plendojn al tirano,
 laŭpaŝe ĉantas la koleron nur en laŭto.
 Mi ne domaĝas mian senvaloran ĥaton
 sed ĉiam mi sopiras al gepatra lando.
 Mi volas, ke riveroj iĝu kampa granda
 ke ni haŭlistoj ne plu priplendu malŝaton.

Tradukis **Vejdo**

Edz-sopira Roko

Starante sur verdeta monto,
 vizaĝe al rivera ondo,
 la rok' obstinas por eterne,
 vidante lin en vagabondo.
 Tra pluv' kaj vento nokte-tage,
 ĝi pretas diri ĉe renkonto.

Tradukis **Vejdo**

Vilaĝo en Pluvo

En pluv' aŭdiĝas kokerik' ĉe ĥatoj je foj-fojo,
 tra bambutufoj sub pontet' oblikva fluas rojo.
 Por silkraŭpid' prizorg' virinoj voke sin
 invitas,
 en kort' nur gardenioj staras kun senfara ĝojo.

Tradukis **Vejdo**

Ĉineske

Vejdo

Rememoro pri Knabeco

—laŭ ĉinesko Manjianghong*

Omaĝe al Infana Tago 2007

tagoj jaroj
 forpasis

rememoro
 nur svaga
 restas ene.
 juna koro
 ne konis kaj ĉagrenon
 kaj ĝenon. Nur fervoro
 por ludo
 por petolado
 ignoro

al lac' kaj
 doloro
 fariĝis
 motoro
 kreiva nuna
 nokta horo
 adventurplena formis
 min spitant' al hororo
 plej gravis
 senscia mia
 esploro

* unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj po 11 versoj de 434,344,77,353 kaj 33,33,54,77,353 silaboj respective, laŭ rimaranĝo x,x,a,x,x,a,x,a,x,x,a/x,a,x,a,x,a,x,a,x,x,a (x=senrima)

Lily

Knabino de Sol-Patrino

—laŭ ĉinesko Guizhixiang*

panj' kruela
 enŝlosas min en
 spaco ĉela
 for de amiko
 la miela
 ĉu mi severe kulpas
 en faro
 tagohela
 varma kiso
 brakumado
 ĝu' ĉiela

nur ludo bagatela

mi sentas iom
 min amcela
 tamen vi persvadis
 neribela
 ĉu mi nun povus montri
 min tiom
 nefidela
 ĉio estas
 nur burĝono
 ama bela

* unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj po 11 versoj de 4,54,64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,x,a,x,a,x,x,a,x,x,a (x=senrima)

kaj raci'
 frontas foj-refoje
 sen ajn emoci'
 al disiĝoj
 de sent-apati'
 daŭre vin serĉadas
 kun rideto
 neeble
 aperu mi

* unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj po 9 versoj de 335,45,6434 / 3,65,45,6434 silaboj respective, laŭ rimaranĝo xxa,xa,xxxa / a,xa,xa,xxxa (x= senrima)

Xi Murong

Elegi' al Vivo

—laŭ ĉinesko Qinpingyue*

dumvive mi
 ne kun emoci'
 vin plu vidas, ĉar la
 renkontot' ne estas vi

ne aperu vi plu
 en mia memorĝu'
 sed tiuj ŝanĝiĝoj
 vivaj kaj tempflu'

* unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj po 4 versoj de 4,5,7,7,6,6,66, laŭ rimaranĝo a,a,a,a,b,b,xb (x = senrima)

Kial?

—laŭ ĉinesko Shanhuazi*

la plumon ŝlosi plene
 mi povas. kial ene
 ĉagrenon, amon povas
 mi pene

ne povas? kial ĝojo
 efemeris fal-svene
 kaj bona temp' foriras
 senĝene

* unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj po 4 versoj de 7,7,73 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,xa (x=senrima)

Ekkompren'en Pluvo

—laŭ ĉinesko Zhuyingtaijin

se pluvon
 re pluvo
 sekvas en seri'
 se ĉagreno
 ripetas jen pli
 sen ĉes' sen lim' sen fin'
 mi volonte
 aplombe
 kun ekkonsci'

Hejmveo

—laŭ ĉinesko Yexingchuan*

hejmlanda mia kanto —
 jen fluto
 de ŝveb-lanto
 ĉiam ludas
 en lun-nokto
 vizi' de hejmlando

